



Komencanto



Somera koncerto

Petrova Jekaterina
[Magnitogorsk, Rusio]

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

majo
- junio

Claude Piron rakontas pri sia esperantistiĝo

"Gerda malaperis" – instrulibro por komencantoj – verkoj de niaj legantoj
diversaj ondoj el bunta mondo: samovaro - simbolo de Rusio
gramatika leciono de J-L Tortel – aforismoj, ŝercoj, anekdotoj –
la praktiko: pri Vikipedio – impreso – korespondu!



Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

- UEA** - Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando
- Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910
- Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.
- Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson
St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000,
Antwerpen
- Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia
(DF) - BR - 70084-970
- Britio** David Kelso, 5 Craighenill Road, Carluke, ML8 4QT
- Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorčka 1, CZ-696 62 Stržnice
- Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037,
Beijing
- Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.
- Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.
- Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
- Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceri-
saie, 75004, Paris.
- Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse,
9 D-55129 Mainz.
- Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada
n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.
- Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184,
TEHRAN
- Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Mi-
lano.
- Italio, Kroatio, Slovenio** Višnja Brankovič
Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste
- Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood,
Dublin 6W
- Japanio** Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to,
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3
- Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-
08200, Sabadell
- Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa
11300, Havano
- Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k.
167.
- Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18,
N-0572 Oslo
- Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews,
Christchurch 8004
- Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-
137, PL-01-865 Warszawa
- Portugaliao** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto,
N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa
- Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8,
SE-242 35, Horby
- Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH —
4224 Nenzlingen
- Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El
Cerrito, California 94530, U.S.A.

Karaj legantoj!

Jen venis somero, riĉa de sunaj tagoj kaj laktohelaj noktoj, de herba susuro kaj zumo de loskutoj en herbejoj. Kaj kune kun ĝi ĉe multaj aperis anima aspiro al somera ripozo kaj vojaĝoj.

Nur kelkajn monatojn ne ĝisvivis ĝis tiu ĉi somero Claude Piron, pri kiu ni rakontas ĉi-foje en nia tradicia rubriko "Kiel tio komenciĝis". Kelkajn monatojn antaŭ lia subita forpaso ni petis lin rakonti pri sia esperantistiĝo kaj ricevis la jenan respondon tiam:

Karaj Geestimatoj! En mia verko "La bona lingvo" (2-a eld., Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo), vi trovos sur paĝo 8, sub la titolo "Stranga esperantisteco", rakonton pri tio, kiel mi malkovris Eon kaj komencis praktiki ĝin. Mi proponas, ke vi simple uzu tiun tekston. Amike, CP

Nur nun ni povas uzi tiun lian proponon kaj permeson, kun granda bedaŭro konsciante, ke jam ne estas al kiu sendi aŭtorajn specimenojn de la revuo kun la artikolo. Grandegan signifon de personeco de Claude Piron por moderna E-mondo apenaŭ eblas supertaksi. Kiom da li sukcesis fari por Esperanto dum sia vivo! Kaj nun por ni, esperantistoj, restis multaj liaj libroj, legante kiujn ni povas multegon lerni, kompreni, eble ankaŭ rerigardi nian rilaton al jam bone konata...

En rubriko "Verkoj de niaj legantoj" vi trovos debutan rakonton de Serge Eysseria el Francio pri olivarbo, konsiderata kiel arbo de paco kaj la olivoleo, kiun ni povas ricevi de ĝi. La rakonton sendis al la redakcio nia leganto kaj korespondamiko de Serge Olga Goriĉenko. Antaŭe simile okazis debuto de Olga mem, kiam ŝian rakonton "La poploj" sendis por publikado en la revuo ŝia korespondamikino el Finnlando.

Nin ĝojigis nova, ĉi-foje ne traduka, sed originala kontribuado de E-turisto el Rusio A. Naumov. Kaj ankoraŭ unu debuto en la rubriko. En ĝi temas pri la evento iam okazinta en Siberio kaj ĝis nun restanta granda enigmo por sciencistoj kaj ordinaraj homoj. Andrej Grigorjev el Siberia urbo Krasnojarsk intervjuis faman esploriston de tiu ĉi mistero. Ni gratulas Andrej okaze de interesa, neordinara ĵurnalista materialo!

En la rubriko "Simboloj de la landoj" vi trovos vican originan rakonton de nia aŭtoro Vladimir Opletajev pri rusia teujo – samovaro, kiu jam delonge rolas kiel unu el simboloj de Rusio.

J-L Tortel daŭrigas humure kaj serioze trakti specifajn E-gramatiko. Ni ne plu komentu – legu mem!

En "La praktiko" ni donas atenton al la reta enciklopedio "Vikipedio", kiu jam superis 100000 da artikoloj en Esperanto. En "La impresoj" legu la kontribuojn de futbal-ŝatanto kaj nia malnova aŭtoro S. Paĥomov. akompanata de kelkaj anekdotoj kaj bildo.

Agrablan legadon!

la red.

Komencanto

2008 numero 3 // (71) regule aperas ekde 1998
redaktas kaj eldonas: Raja Kudrjavceva
adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio
retpoŝto: komencanto@r66.ru
abontarifo por 2008:

internacia tarifo: 18 eŭroj

orienteuropa kaj latinamerika tarifo: 15 eŭroj;

aerpoŝta aldono 2 eŭroj

konto ĉe UEA: [vkud-a](https://www.uea.info/uea/uea-accounts)

rusia tarifo: 200 rusiaj rubloj poŝtmandate al:


Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,
Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Kiel tio komenciĝis

Claude Piron

Tiel okazis, ke kelkaj monatoj antaŭ la forpaso de Claude Piron redakcianoj de “K” petis lin rakonti por la revuo pri sia esperantistiĝo. Tiam li afable adresis nin al la koncerna ĉapitro de sia libro “La bona lingvo” kaj proponis uzi tekston el ĝi, kion ni, bedaŭrinde, nur nun povas fari.

Claude Piron [1931-2008] estis monde konata svisa esperantisto. Profesie li estis lingvisto kaj psikologo, de 1956 ĝis 1961 laboris kiel tradukisto por Unuiĝintaj Nacioj (tradukis el la ĉina, el la angla, el la rusa, kaj el la hispana al la franca). Claude Piron estis membro de la Akademio de Esperanto, honora membro de UEA kaj membro de Esperantlingva Verkista Asocio. Aŭtoro de la fama originala libro-serio, konata kiel “Ĉu...” serio (“Ĉu vi kuiras ĉine?”, “Ĉu ŝi mortos trafike” ...), de konata lingvo-instrua romaneto “Gerda malaperis” kaj ankoraŭ de multaj diversaj verkoj.



Stranga esperantisteco

franca vortaro “Larousse” mallongan klarigon indikantan la funkcion de ĉiu finaĵo, kaj per ĝi mi analizis mian Gevaert-dokumenton, pli kaj pli admire, sed ankaŭ pli kaj pli malĝoja pri la nepovo lerni plu. Unu el miaj onkloj estis siatempe esperantisto kaj ankoraŭ havis librojn pri la lingvo, sed li loĝis malproksime kaj pri lia iama aparteno al la movado mi eksciis nur post pluraj jaroj.

Fakte, min helpis hazardo. En iu subtegmento, amiko trovis malnovan volumon, kiu estis bindita kolekto de revuo porknaba el la jaroj 20-aj. En ĉiu numero troviĝis esperantoleciono. Avide mi ĵetis min sur ĝin. Post eble tri monatoj mi legis la lastan tekston, kiun mi plene komprenis. Kvankam mi neniam uzis lingvon aktive, escepte por fari la ekzercojn, mi havis la senton, ke mi nun posedas ĝin. Eble miaj subjektivaj starpunktoj pri la lingvo devenas de tio, ke el tiu iluzio mi neniam resaniĝis. Estis infaneca reago: la fakto, ke mi atingis la lastan lecionon, signifis por mi, ke mia studo nun estas kompleta.

Iusence, ĝi montriĝis kompleta: mi povis per ĝi esprimi ion ajn. La radikaro, kiun mi disponis, estis limigita. Sed la ebloj kombini, kiujn la strukturoj de la lingvo al mi havigis, estis tiel vastaj, ke mi ne devis peni multe por trovi solvon al ĉiuj esprimproblemoj. Mi bedaŭrinde ne memoras verajn

ekzemplojn, sed la sistemo estis jena: se mi bezonis vorton por la koncepto “imagi al vi” kaj tiu ne troviĝis en mia vortprovizo, neniam mi pensus, ke mi povus enkonduki novan radikon, mi provis esprimi la ideon per la haveblaj elementoj. Mi do dirus, ekzemple, *bildigu al vi* aŭ *prezentu al vi*. Se mankis la vorto “traduki”, mi diris *translingvigi*, aŭ *alilingvigi*, aŭ uzis formon kiel *esperantigi*, *elangligi*, k. s. Fakte, kiel dirite, la du menciitaj radikoj troviĝis en mia vortareto, sed mi tamen uzis ankaŭ la sinonimojn, kiujn mi elpensis, ĉar ĝuste la fekundeco de la vortfara sistemo estis por mi plej dankoveka donaco, senkompare ĝojdona.

Tiutempe mi ne sciis, ke ekzistas esperantistoj. La plenkreskuloj, kiujn mi demandis pri la verko de Zamenhof, respondis, ke temas pri fiaskinta projekto, aŭ pri speco de eksperimenta lingvo, kiun neniu iam ajn parolis.

Negrave. Mi tiom enamiĝis al ĝi, ke ĝi fariĝis la lingvo plej uzata en mia pensado. Kiam mi estis sola, mi parolis per ĝi laŭvoĉe, por frandi ĝiajn sonojn, kaj probable ankaŭ por la plezuro konstati, kiel kontentige vortoj surprize trafaj spontane formiĝas en mi. Mi ne serĉis tiujn vortojn. Mi nur havis penson, kaj eldirante ĝin mi mire rimarkis ian novkombinon, kiun mi trovis plaĉa kaj esprima.

Mia intereso pri lingvoj sendube fontas el mia junaĝa malkovro de esperanto, kiu okazis jene. Mi estis naŭjara, kiam trafis en miajn manojn multlingva presita papereto, kiu akompanis tiuepoke (1939, 1940) filmojn produktatajn de la firmao Gevaert. Ĝi entenis du partojn: la dua titoliĝis *Garantio* kaj pri la unua mi memoras nur, ke ĝi komenciĝis per la vorto *Senpaga*. Tiu vorto kvazaŭ hipnotigis min, tiom ĝi malsimilis al sia traduko en la aliaj lingvoj. Kaj jen fulme ekkompreno ekbrilis en mi: en mia loka dialekto, ja *se* signifas “sen” kaj *pajf* “pagi”, ke en tiu lingvo kun la stranga nomo (stranga per tio, ke ĝi ekvokis nek landon, nek popolon) la franca *gratuit* esprimiĝas per unu vorto kunmetita el la ideoj “sen” kaj “pagi”, tio estis pli ol mirinda: admirinda. Tiusekunde mi enamiĝis al la lingvo. Kaj mi decidis, ke iam mi scios ĝin.

Dum du jaroj mi provis trovi manieron lerni la miraklan lingvon, sed vane. Mi trovis en la granda

Kun ĉiu tago kreskis mia admiro al la lingvo. Mi uzis ĝin por verki taglibron, en kiu lokiĝis ankaŭ multaj kantoj kaj poemoj.

Post iu tempo, unu el miaj fratoj lernis la lingvon, kaj, ĉar la cirkonstancoj apartigis nin dum unu jaro, ĝi iĝis tiutempe nia letera komunikilo. Ĝi rolis por ni kiel sekreta lingvo. Perfekte taŭga.

Kaj jen, kiam mi estis 15-jara, sekve al du hazardoj, kiujn detaligi estus tro tede, mi ekkonis la esperanto-movadon. Mi estis ege ĝoja ekscii, ke mia frato kaj mi ne estas soluloj, ke ankaŭ aliaj homoj admiras la zamenhofan mirindaĵon, kaj aktive uzas ĝin. Ve! La unua renkonto estis katastrofa. Mi defalis de plej alte. El la vundo (la *traŭmo* se vi preferas fakjargoni), kiun mi travivis tiufoje, mi neniam resaniĝis. Tiuj franc-lingvanoj parolis ne tre flue, multaj eĉ preskaŭ balbute, pro nebona regado de la lingvo, kaj ili uzis, kun terura lastsilaba akcentado, ĉiaspecajn vortojn, kiujn – laŭ mia impresio – ili simple ĉerpis el aliaj lingvoj, ĉefe el la franca, maskante la fremdecon per esperantaj finaĵoj.

Eble jam okazis al vi, ke en malnova urbo vi ege ŝatis placon, ĉar ĝin ame kaj arte aranĝis, antaŭ longe, homoj plej talentaj, kaj jen vi revenas post iom longa restado alilande, antaŭĝojas la revidon kaj... ĉio estas fuŝita. La harmonion de la loko oni mortbatis: mala-peris la malnovaj tilioj, kiuj ornamis ĝin kaj plaĉe bonodoris, staras nun moderna alta konstruaĵo, kiu fuŝas la tutan etoson, oni forprenis la antikvan fontanon por fari spacon por la aŭtoj, unuvorte, oni multrilate difektis ion plej karan al via koro. *Sakrilegio!*, vi diras al vi, amare.

Tian senton mi havis, renkontante miajn unuajn esperantistojn. Ili difektis ion, kio estis sankta. Ili ne konsciis la belecon. Pri la fekundeco de la genia sistemo, ili ŝajne havis neniun ideon. Kaj la lingvon ili tiom komplikis al si, ke ili ne povis uzi ĝin flue. Mi sentis min perfidita.

Sed samtempe mi eksciis, ke esperanto uziĝas tutmonde. Jes, eĉ en Japanio kaj Ĉinio, eĉ en Orienta Eŭropo, eĉ en Sudameriko. Resti sola kun mia riĉa, flua sed bazvorta lingvo estus stulte. Por la kontaktoj mi do rezignacie akceptis (iom) ŝanĝi mian lingvaĵon. Baldaŭ mi korespondis kun diverslandaj esperantistoj, i.a. knaboj el orienta Azio, samaĝaj kiel mi, kun kiuj mi interŝanĝis plej interesajn leterojn. Kaj jen dua surprizo: iliaj leteroj, kvankam ne plene laŭnormaj gramatike, estis en la sama lingvo, kiun mi sola, aŭ kun mia frato, praktikis dum tri jaroj! Ni povis tuŝi ĉiajn temojn, kaj perfekte interkompreniĝis. Ni intersendis ŝercojn kaj poemojn, kaj por tio ne necesis dikaj vortaroj. Mi retrovis plezure *la bonan lingvon*, kiun mi tiom amis...



Bildo el "La Sago"

Claude Piron – E-kavaliro

Post sia laboro kiel tradukisto-protokolisto ĉe UN, Claude Piron laboris por Monda Organizaĵo pri Sano. Li ankaŭ uzis Esperanton en multaj landoj: Japanio, Ĉinio, Uzbekio, Kazahlando, kaj kelkaj lokoj en Afriko kaj Latina Ameriko, kaj preskaŭ en ĉiuj eŭropaj landoj. Li instruis Esperanton ĉe la Ŝtata Universitato de San-Francisko.

Studinte psikologion, li iĝis psikoterapiisto, havis privatan psikologian kabineton kaj instruis en la Psikologia kaj Edukscienca Fakultato de Ĝeneva Universitato. Lia franclingva libro "La Lingva Defio – El haoso al sana prudento" estas speco de psikanalizo de internacia komunikado.

Claude Piron multe verkis esperantlingve. Sub la pseŭdonimo Johán Valano li publikigis poemaron, kantokasedon, kvin detektivajn romanojn (fama "Ĉu" – serio) kaj kolekton de noveloj. Piron tradukis kantojn el pluraj lingvoj kaj fojfoje mem prezentis ilin, akompanante sin per gitaro. En 1982 ĉe LF-koop, aperis lia sonkasedo "Frandu Piron". Sub la propra nomo Claude Piron publikigis multajn lernolibrojn, facilajojn, el kiuj la plej famaj estas verkoj "Gerda malaperis" kaj "La bona lingvo".

En "La Bona Lingvo" Piron kaptas la bazajn lingvistikajn kaj sociajn aspektojn de Esperanto. Li tezas, ke Esperanto pli facilas ĉar ĝi respegulas bazajn mensajn principojn rilate al lingva lernado, kaj pro la ĝeneraligo de gramatikaj formoj kaj reguloj. Li argumentas kontraŭ enporto de novaj radikoj, montrante la esprimovon de baza vortprovizo kaj imagema kunmetado.

Gerda Malaperis estas romaneto, lernolibro kiu uzas bazan gramatikon kaj estas aranĝita tiamaniere, ke ĉiu ĉapitro kompreneblas pli facile ol la antaŭa; ĝi laŭgrade kondukas al sperta esperanto; fine, vortlistoj ekzistas por kelkaj lingvoj, do komencantoj facile sekvas la lecionojn. Ĝi jam iĝis bazo de unu el la senpagaj retroŝtaj kursoj.

Ĉi tie ni prezentas la fragmentojn el verko de Claude Piron "Gerda malaperis". Ĝi estas tre bona instrulibro por komencantoj, verkita surbaze de ĉefaj principoj de psikopedagogio. Espereble ke niaj legantoj, kiuj estas komencantoj en la lingvo, trovos eblecon por plene tralegi tiun ĉi libron cele perfektigi sian lingvoscion.

Antaŭparolo al "Gerda malaperas!"

Esploroj pri psikopedagogio montris, ke por igi la instruon kiel eble plej efika, necesas respekti serion de principoj. Ĉi tiu libro prezentas provon apliki tiujn al la instruado de esperanto, i.a. la jenajn:

1. Motivi la lernanton.

La ĉefa faktoro en la sukceso de lingvolernado estas motivado. Por tiun favori, la libro prezentiĝas kiel aventurromano, en kiu jam en la dua ĉapitro atentokapta okazaĵo tiklas la scivolemon kaj instigas la lernanton legi plu.

2. Apliki la regulon "ju pli ofta la vorto, des pli frue enkonduki ĝin".

La reguleco de esperanto ebligis tion fari tuj de la komenco. Internacia Kultura Servo en Zagreb havigis la necesajn laŭ-oftecajn vortlistojn, ricevitaĵojn per statistika prilaborado de konversacioj surbendigitaĵoj okaze de diversaj internaciaj kunvenoj.

3. Ripetadi en malsamaj kunteksto

Radiko, vorteto aŭ lingva strukturo asimiliĝas des pli senpene, ju pli ofte ĝi ripetiĝas, ĉefe se oni atentis la gravecon ree prezenti ĝin precipe en la momento kiam, ne uzante dum iu tempospaco, ĝi emus forgesiĝi. Tiu principo estis observata. Espereble la legantoj bonvolos pardoni la kelkfoje nenaturajn ripetojn, stile ne tre belajn, kiujn la teksto pro tio enhavas.

4. Redukti plej severe, en ĉiu instruunu, la proporcion de novaj lernendaĵoj.

Tiel ĉiu nove enkondukata elemento estas kvazaŭ portata de la tuta kunteksto. En ĉi tiu libro novaj vortoj aperas tiamaniere, ke asimilinte la enhavon de la unua ĉapitr(et)o, la lernanto jam komprenas almenaŭ 82 procentojn de ĉapitroj 2 ĝis 8; 89 procentojn de ĉapitro 9 ĝis 12; kaj 92 procentojn de la tekstoj post ĉapitro 12. Fakte, la lasta ĉapitro enhavas nur 3 procentojn de novaj radikoj.

Ĉapitro 5

Bob: Nu, vi ankoraŭ ne diris al mi, amiko, kio okazis, dum vi spione rigardis tiun paron.

Linda: Okazis io vere stranga.

Tom: Vere stranga, fakte. En la mano de tiu junulo estis io.

Bob: Kio?

Linda: Ni ne povis vidi. Io tre eta. Malgranda afero. Afereto.

Tom: Kaj dum ŝi ne rigardis, lia mano alproksomiĝis al ŝia taso.

Linda: Kaj kiam ŝi ekrigardis lin, lia mano ekhaltis.

Tom: Tiam li montris ion al ŝi. Evidente, li deziris forturni ŝian atenton.

Linda: Kaj li sikcesis. Li plene sukcesis. Ŝi rigardis al la pordo. Kaj dum ŝi rigardis for, lia mano subite estis super ŝia taso, dum unu sekundo, ne pli, kaj tute nature revenis. Malplena.

Bob: Ĉu ĝi estis plena antaŭe?

Tom: Ne plena. Kompreneble, ĝi ne estis plena.. Sed estis io en ĝi, kaj post kiam ĝi estis dum sekundo super la taso de Gerda, estis plu nenio en ĝi.

Linda: Certe estis iu mistera substanco.

Tom: Iu drogo.

Bob: Kiel vi povas scii, ke ne estis tute simple peco da sukero.

Linda: Li ne agus tiel kaŝe, se estus nur sukero.

Tom: Cetere, ĉi tie ne estas peca sukero. Estas nur pulvora sukero, en sukeroĵo.

Bob: Eble li havis sukerpecon en la poŝo kaj ...

Tom: Ĉu vi ofte promenas kun sukerpecoj en via poŝo?

Bob: Vi pravas. Tiu ideo estas absurda. Tamen...

Linda: Rigardu! Jen ŝi ekstaras, kaj ekiras for.

Bob: Ŝi ŝajnas tute normala. Verŝajne, vi imagis ion dramatan, dum temas pri tute simpla, tute natura okazaĵo.



Serge Eysseria [Francio]

Gusto de olivoleo

Tiu ĉi verkon de sia korespondamiko petis publikigi en "K" Olga Goriĉenko, do, por Serge Eysseria tio estas debuto. Antaŭ kelkaj jaroj same unuan verkon de Olga Goriĉenko mem ni ricevis de ŝia korespondamikino el Finnlando. Tiel E-amikoj kuraĝigas unu la alian al verkado.



Olivarbo estas konsiderata en ĉiuj ĉirkaŭaj mediteraneaj civilizacioj kiel arbo de paco. Kial?

Sendube pro ĝia escepta vivdaŭro – fakte, ekzistas miljaraj arboj – , krome pro ĝia aparta aspekto: kun ĝia dika nodoplenta trunko, ĝiaj kliniĝantaj branĉoj, arĝentaj folioj, ĝia granda adapto al kapricoj de mediteranea klimato, kiu alternigas koleremajn fulmotondrojn kaj longajn periodojn de sekeco.

Nenio estas pli agrabla ol promonado en fruktoĝardeno de olivarboj; olivkulturistoj, kiuj laboras en tiu medio estas rimarkindaj pro sia kvieteco, sia simplanimeco. Estas memkompreneble, ke tia arbo produktas rimarkindan frukton, olivo, kiu, premigite donacas puran sukcon kun raraj gustoj: olivoleo.

Konvenas precizigi unue, ke olivoleo estas kundimento – t.e. stimulaĵo, kiu plialtigas la kvaliton de la manĝoj. Olivoleo ne konsumiĝas pura; ĝi estas parto de multaj pladoj, kies guston ĝi riĉigas; ĝi estas vera parto de la gustoj, kiujn oni renkontas en mediteranea manĝokutimo.

Por havigi la plej bonajn rezultojn en la kuirado, konvenas koni la ĉefajn olekategoriojn kaj iliajn diversajn karakterizaĵojn.

Kutime oni klasifikas olivoleojn en tri grandaj kategorioj: olivoleojn, kiuj posedas “verdan fruktoguston”, “maturan fruktoguston” kaj “nigran fruktoguston”. En ĉiuj el tiuj kategorioj troviĝas varieblaj intensecoj, flaraj kaj gustaj, klasifikeblaj: intensa, meza, dolĉa.

Por apreci tiujn ĉiujn nuancojn, la gustumanto de oleo procedas laŭ elprovitaj teknikoj, kies ĉefaj etapoĵ tiel disvolviĝas:

La analizota specimeno – t.e. kelkaj mililitroj – estas metita en glason, ĝenerale koloran – la vida aspekto de oleo, tre varia, ne estas trafa indiko – kaj estas varmigita je 25-28 gradoj.

Je tiu temperaturo, la volaltaj elementoj de oleo eliĝas kaj per rapidaj enspiroj la gustumanto taksas la flarajn karakterizaĵojn de oleo.

Venas poste la gusta esploro: la gustumanto enbuŝigas etan oleokvanton, longe manĝas ĝin, taksas la nuancojn kaj ĉiŝfine glutas aŭ kraĉas ĝin.

Tiel, en la verda fruktogusto, la gustumanto trovas verdaĵodorajn kaj gustojn de: ĵus tranĉita herbo, freŝa fojno, ruĝaj fruktoj (nigra ribo, frago aŭ frambo), tomato-frukto, avelo...

En la nigra fruktogusto, la oleo posedas karakterizan longan enbuŝdaŭrecon; praktike ne plu estas vegetalaj sensacoj, sed plie, gusto de nigra olivo, de fungo, de sudarbejo, kelkfoje kakao aŭ konfitaĵo.

Kiu estas la devenoj de tiuj diversaj gustokategorioj?

Du faktoroj superas: la arbovariaĵoj, kaj la rikoltodato.

Koncerne la francajn variaĵojn, la verda fruktogusto devenas el tiuj olivarboj: «Aglandau», «Picoline», «Bouteillan»...; la matura fruktogusto el: «Lucquiers», «Negrettes».


Koncerne la rikoltodaton, ju pli ĝi estas frua, des pli la verda fruktogusto precipas; ju pli ĝi estas malfrua, des pli la matura fruktogusto superas.

La kazo de la nigra fruktogusto estas alia; la fruktoj antaŭ pistomiksado, estas metitaj en tiaj kondiĉoj, ke fermentado efektiviĝas en la frukto mem, tiam aperas novaj gustoj kaj odoroj: tia produktaĵo estas kelkfoje nomita: oleo laŭ malnova metodo.

La kuiristo aŭ kuiristino devas bone posedi konon pri oleo, kiun li aŭ ŝi aĉetas, utiligas en sia kuirarto.

Harmonio inter la ingrediencoj kaj la oleo gravas, do povas esti, ke li aŭ ŝi aspiras bonegajn rezultojn por regali parencojn, amikojn.

Tiel li aŭ ŝi partoprenas iomete, je sia eta skalo, en la pravigo, ke olivarbo estas arbo de paco.



Sur la paĝo estas bildoj de Timur Halilov [Jekaterinbyrg, Rusio]

Ni jam publikigis sur paĝoj de "K" tradukprovojn de esperantisto kaj turisto Andrej Naumov el Rusio. Ĉi-foje li ekkuraĝis por verki originalaĵon.

10 kialoj lasi molan fotelon

Andrej Naumov [Novoaltajsk, Rusio]



①

Amo al naturo, arbaro, kiu profunde vivas en la animo.

②

Psikologia libero de mono - monbiletoj en sovaĝejo fariĝas nur belaj paperpecoj, taŭgaj eble por ekflamigi lignofajron.

③

Foresto de problemoj, kiuj turmentas animon en la urba tumulto - infanoj, nepoj, laboro, trafiko, buĝeto kaj tielplua marĉo.

④

Anima komforto de ĉiutaga komunikiĝo kun agrablaj homoj, kiuj plenigas, riĉigas kaj defendas vin per sia anima varmo. Mi, ekzemple, ĉiam ŝatas iri al pied' aŭ boat-marŝoj kun bone konataj homoj.

⑤

Nekomparebla sento de fiero, (kiu superplenigas vin kvazaŭ aerbalonon) post konkero de ŝajne nekonkerebla natura obstaklo - akvofalo, intermonto, tuttaga piediro laŭ rokaj deklivoj, danĝera marĉo, densa arbaro. En via sango bolas adrenalino, kiu portas al vi plej fajnan plezuregon, pli fortan ol ajna narkotaĵo.

⑥

Lignofajro. La eterna magio de dancanta fajro, de kiu ne eblas fortiri rigardon. Katalizilo de romantika humoro, rememoroj, fantazioj kaj revoj. Ĝi estas via varma ĉiutaga kunulo, kiu donacas al vi varman manĝaĵon, longdaŭran vesperan teumadon, spicitan per turistaj kaj vivaj historioj kaj aventuroj, kantoj kaj versaĵoj.

⑦

Mozaiko de ĉiutage ŝanĝantaj pejzaĝoj, pitoreskaj vidoj de riveraj bordoj, bildoj de sunaj rebriloj sur kirlantaj torentoj de monta rivero, kiu donacas al vi estetikan plezuron kaj raven antaŭ tiu belo kaj potenco de naturo, kiun vi feliĉas percepi.

⑧

Ĝojo de memestimo fine de la marŝo. Jes! Mi povis! Mi faris! Mi eltenis! Memestimo estas fonto de pluraj gloraj agoj kaj atingoj en sporto, scienco kaj ajna sfero de agado.

⑨

Espero! La sento, kiu savas la homojn en seneliraj situacioj. Vi foriras al turisma piedmarŝo kaj atendas, kaj esperas je io interesa, neordinara, bonŝanca, atentokapta, nekutima. Kaj atendas tion de ĉiu nova tago de la ekspedicio. La ebriga eliksiro de kunfronto kun io nova, kiu faras nian vivon pli interesa, pli riĉa pli streĉa kaj multkolora.

⑩

Mi ne parolu pri aliaj, sed min persone en naturmarŝoj ĉiam akompanas mia liro kaj mia inspiro, kiuj vokas al novaj sentoj kaj novaj agoj. Kaj la plej efika rimedo ekkoni novajn sentojn, kiuj igas al agoj estas konkero de novaj horizontoj, riveroj, arbaroj, montoj sur kiuj vi ankoraŭ ne estis!

Venis varma sezono de la jaro. Kaj en tiu tempo ni, urbaj loĝantoj - oficistoj kaj laboristoj, kuracistoj kaj kuiristoj, sciencistoj kaj ŝoforoj, fraŭlinoj kaj malinoj, avoj kaj nepoj, sendepende de la aĝo, sekso aŭ politikaj preferoj direktas niajn nazojn, rigardojn kaj animojn al la Naturo, kiu tiras nin al si kvazaŭ magnito la feran forkon.


Apenaŭ ekzistas homo, kiu ne ŝatas naturon. Sed specoj de la naturŝatantoj estas diversaj - iuj ŝatas promeni en parko, por aliaj sufiĉas eksterurba pikniko, la triaj preferas esti apud lazura marbordo kaj loĝas en komforta hotelo.

Sed ekzistas kategorio de homoj, kiuj el ĉiuj specoj de ĉenatura ripozo preferas piediri aŭ boatnavigi en sovaĝajn angulojn de la naturo, kiuj feliĉe ankoraŭ restis sur nia planedo, foriri tien, kie ne estas ŝoseoj kaj hoteloj, kie forestas amaso kaj bruo, kie ne fiodoras de aŭtoj, sed kie regas silento kaj trankvilo, kie nur rebrilas araneajoj pendantaj inter pinaj branĉoj kaj aŭdeblas nur birdaj triloj kaj susuro de foliaro pro karesaj tuŝoj de venteto.

Kio puŝas homojn al Naturo? Ĉu interna eterna voĉo de niaj pra-pra-pra-uloj, kiu profunde troviĝas ie en sekretaj anguloj de la homa konscienco? Aŭ io alia?

Tiuj, kiuj ŝatas pasigi siajn feriojn en foraj arbaroj, sur pitoreskaj riveroj kaj aliaj malproksimoj, nomis 10 kialojn, pro kiuj ili preferas aktivan "ripozon" - kun dorsosakoj, kajakoj, tendoj kaj lignofajro. La kialoj estas jenaj:

1908 - 2008: Enigmo de Tunguska katastrofo



La 30-n de junio estis signifa evento - 100 jariĝo

de grandioza enigma akcidento, okazinta en Siberia tajgo

ĉe rivero Tunguska en Krasnojarska teritorio. Pri la jarcenta Enigmo kaj sciencaj ekspedicioj al la centro de la katastrofo rakontas fama tunguska esploranto Jurij Lavbin, kiu organizis ĉirkaŭ dek sciencajn vojaĝojn por trovi elementojn de la "Tunguska meteoro". Direktis la konversacion kaj esperantigis Andrej Grigorjev [Krasnojarsk, Rusio]

Depiede surkapon Ekspedicio - 1

— Post du vojaĝoj al Tunguska tajga regiono ni, esplorantoj de la fenomeno de Tunguska pensis, ke trovis lokon, kien falis la meteoro kaj necesas nur pruvi tion ĉi, kunliginte niajn trovaĵojn kaj analizon de la ete dispersita substanco en la globetoj, trovitaj ĉe Tunguska. Ĝenerale ŝajnis, ke oni povas trankviliĝi.

Sed fine de vintro ni eksciis pri iu enigma loko, situanta profunde en tajgo; rigardinte la rezultojn de aerofotado de tiu ĉi loko, ni estis ŝokitaj: tio, kio estis sur la fotoj, renversis la tutan klasikan imagon pri la trajektorio kaj kontakto de la kosma objekto — meteoro (?) de Tunguska kun la Tero somere de 1908 jaro. Ne restis iuj duboj pri tio, ke la someran ekspedicion necesos dediĉi al tiu loko kaj al neniu alia! Kial? Ĉar laŭ la fotoj de la grandega, etendiĝinta je 40 km spuro de arbofalado, la nekonata objekto alflugis Siberion de okcidente, sed ne de sud-oriente, kiel antaŭe opiniis la tuta oficiala scienco.

— *Jurij Dmitrieviĉ, memorigu kurte la hipotezojn, kiuj rilatas al la enigma Tunguska meteoro kaj baziĝas sur la nerefutebla fakto, ke la 30-n de junio de 1908 jaro en la senhoma tajga regiono apud la rivero Podkamennaja Tunguska okazis renkonto de Tero kaj iu kosma objekto.*

— Ekzistas tri ĉefaj hipotezoj (ĝenerale nun ekzistas ĉirkaŭ 150 neoficialaj hipotezoj):

a) flugis kometo; b) flugis iu substanco de nekonata energio; c) flugis kosmoŝipo de aliplanedanoj.

Niaj trovoj dum la lastaj jaroj ĉe rivero Kemĉug kaj apud urbo Kansk konfirmas la hipotezon pri tio, ke la kosma objekto povis disfali je kelkaj pecoj. Alivorte la objekto povis turniĝi ĉirkaŭ sia akso kiel turbo, disfalante flanken laŭ la tuta centra Siberio — apud Kansk, apud Kemĉug kaj plie. Sed ekzemple trovinte en tajgo apud Kansk la konatan kvintunan ŝtonegon (kiu eble havas kosman devenon, kio nun estas esplorata), ni trovis tie ankaŭ objektojn, kiuj ĝenerale similas laŭ la enhavo nek la ŝtonegon, nek meteorojn, nek terajn ŝtonojn. Tiuj ĉi rompaĵoj konsistas el vitro kaj metalo, alivorte ili estas vitrometalo kun tre malgranda kvanto de almiksaĵoj. Ĝi similas al la konata materialo *triplekso* (uzata en aŭtovitroj). De kie aperis tiuj ĉi kreaĵoj? La lastaj atingoj en esplorado de Nekonataj Flugantaj Objektoj montras, ke probable ties korpon kovras vitro kaj metalo.

Ni ricevis leterojn de lokaj aborigenoj, kiuj loĝas en la regiono de rivero Podkamennaja Tunguska, pri tio ke en la regiono ekzistas granda direktita spuro de arbarfa-

lado, detruitaj rokoj. Ni decidis detale okupiĝi pri la atestoj. La 27-n de junio ni startis. Niaj atendoj pri io interesa efektiviĝis jam dum aflujo al la distrikto. Ni ekvidis miraklan bildon. Eĉ la helikopteristoj, flugantaj super tiuj ĉi regionoj dum 10-15 jaroj, (kiam pli suprenflugis laŭ nia peto), diris: "Jes, vere, estas tute miriga bildo!" Antaŭ ni etendiĝis grandega, je kelkdek kilometroj arbarfalo, formanta kvazaŭ radiojn el la centra akso. Tion al la fortegaj multjaraj arboj povis fari neniu uragano! Nur grandega eksplodo, direktita interalie de okcidento al oriento!

Kiam ni komencis fari unuajn mezurojn, okazis, ke la aparataro ne funkcias, kvankam en Krasnojarsk ni ĉion kontrolis! Ni tamen komencis fari mekanikrimede la esplorojn. Kiam ni disfosis la grundon, malprofunde trovis karbiĝintajn lignopecojn kaj bastonojn. Kaj ĉirkaŭe abundis falintaj arboj, parte bruliĝintaj. La falado estis direktita al vilaĝo *Vanavara*.

Sekvontage ni decidis supreniĝi sur monteton, proksimume 500 metrojn de alteco, situantan 6 kilometrojn for de la tendaro. Sed, trairinte unu kilometron, ni eksentis pezegon. Pezegon en la kapoj, en la korpoj. Kaj necesis trapenetri interplektitajn abatisojn. Poste klariĝis, ke ni estis 200-300 metrojn de la centro de katastrofo.

Alveninte al la montopinto, ni ekvidis teruran bildon... Anstataŭ montopinto estis miksaĵo de rompitaĵoj kaj arbotrunkoj. La arbotrunkoj estis duonigitaj, la supraj partoj kuŝis 10-15 metrojn for aŭ ĝenerale forestis. Nia grupo tiumomente okazis en iu perdita mondo... Foresto de akvo... La stranga pezo en la korpoj... Por iri reen jam ne estis fortoj. Pene-svene ni tamen revenis, fininte nian viziton al la enigma monto per instalo de la flago.

Sekvontage ni komencis esplori ĉirkaŭaĵojn de la tendaro, trovis trunkojn de 200-300-jaraĝaj pinoj, ĝisduone rompitaĵojn, prenis por analizo lokan grundon, akvon el apuda rojo. La akvo estis bongusta. Necesas indiki: en tiu ĉi regiono absolute forestas birdoj. Sekvontage helikoptere ni flugis reen.

Trovo de la kontaktcentro Ekspedicio - 2

— *Jurij Dmitrieviĉ, kiam okazis via dua ekspedicio al tiu ĉi loko?*

— Nia dua ekspedicio okazis nur fine de septembro. Por pli detala kaj skrupula esploro de la regiono ni

kunprenis magnetkaptilojn, metaloserĉilojn, kvantumajn magnetmezurilojn, radiadmezurilojn, dubligan aparataron. Ni invitis specialistojn el Arbara Instituto kaj el (sekreta urbo) Krasnojarsk-26.

Alfluginte la lokon de la arbarfalo, ni decidis el la helikoptero desupre okulesplori la regionon kaj ties la plej altajn lokojn. Pinto de unu el montetoj estis kvazaŭ detranĉita, havis platan supraĵon, sur kiu videblis nur rompitaj ŝtonoj kaj arb-idar. Same de la helikoptero ni okultrovis **la centron de kontakto**, antaŭe determinitan laŭmape. Tamen alteriĝis ni iom sude, pli proksimen al akvo.

Unuavice ni mezuris la nivelon de radioaktiveco, ĝi estis normala, la kvantuma magnetomezurilo same montris normon. Kiel klariĝis samtage, la ekspedicio denove ne povis kontakti iun-ajn, nia potenca radiostacio kaptis ĉiujn signalojn, sed ĝiaj signaloj povis trafi neniun! En la regiono dekstre de la falo-centro ni trovis grandan anomalion de arboj, sur kiuj abundis ampleksaj surkreskaĵoj, kaj ĝuste sur la okcidentaj flankoj — kaj la objekto flugis ja de okcidento! Endas aldoni, ke tiaj surkreskaĵoj multas ankaŭ sur la tuta esplorata teritorio. La anoj de ekspedicio faris desegaĵojn de proksimume 20 falintaj arboj, travivintaj la katastrofon.

Dum videsploro de la desegaĵoj estis rimarkitaj diversaj nekutimaĵoj: fingrosimilaj, kavetformaj, ringaj — ĝuste tiaj estis ankaŭ sur la specimenoj de ligno, prenitaj en sudaj marĉoj apud vil. Vanavara. Sekvonttage en alia loko ni trovis grandajn kreaĵojn — globetojn, denove faris multajn desegaĵojn de arboj, vivantaj kaj falintaj.

Nia ĉefa celo certe estis la centro de kontakto. En tiu ĉi loko eĉ la grundo estas kvazaŭ enpremita, kavigita kompare kun la ĉirkaŭa supraĵo. Ni ne riskis resti tie por longa tempo, tamen kelkaj homoj eksentis tiun pezon en la korpoj kaj la kapoj, kiun ni sentis dum la unua ekspedicio ĉi tien. Okulfrapis grandegaj elterigitaj arboradikoj deokcidente kaj kolosaj arbotrunkoj, direktitaj orienten. Entute ni rimarkis vastan anomalion de arboj: multpintecon, multtrunkecon, grandegajn surkreskaĵojn. Ni renkontis eĉ t. n. *sorĉistinajn balailon*, kiam el la trunko kreskas ne branĉo, sed alia arbo. Kun tiaj rezultoj finiĝis la lasta tago de la dua ekspedicio.

— *Jurij Dmitrievič, en la komenco de nia konversacio vi diris, ke la rezultoj de tiuj ĉi ekspedicioj ŝanĝis la opinion pri la flugotrajektorio de tiu ĉi kosma objekto, tiel nomata fenomeno de Tunguska meteoro. En kio tio ĉi esprimiĝis konkrete?*

— Unue kaj ĉefe (kvankam necesas certe atendi rezultojn de ĉiuj kontroloj) — ŝanĝo de la trajektorio de kontakto de la kosma objekto kaj Tero. En kelkaj okazoj ĝi ŝanĝiĝas preskaŭ je 180 gradoj ĝenerale.

Konsiderinte ĉion, oni povas diri, ke de okcidento al ni flugis ĝuste kosma objekto. Tamen ĉimomente necesas fari averton. Ja ekzistas rakontoj de ĉeestintoj, kiuj vidis, ke la objekto flugis de oriento. Sed la aliaj vidis, ke de okcidento. Kaj proksimume la kvantoj de la kontraŭaj rakontoj estas egalaj. Sed! La atestintoj pri oriento diris, ke la objekto flugis tagmeze aŭ posttagmeze. Krom tio, la


prioriantan hipotezon subtenas la esploroj, okazigitaj de multaj sciencistoj en sudaj marĉoj apud Vanavara.

Ĝuste tio ĉi estas kaŭzo de tio, ke la orienta trajektorio iĝis la baza. De la okcidenta oni rifuzis. Kial? Ĉar la regiono okcidenten de Vanavara praktike ne estis esplorata. Oni opiniis, ke tie estas nenio. Nun la orienta koncepto komencis rompiĝi. Kial? Ĉar nun estas determinita la loko de kontakto de la kosma objekto kaj Tero. Kaj tiu ĉi kosma objekto flugis de okcidento! Sed kia ĝi estis? Ĉu kometo, ĉu parto de meteoro aŭ kosmoŝipo de aliplanedaĵoj — tion ni devas ankoraŭ esplori.

— *Do, oni povas kompreni, ke estis du kosmaj objektoj? Unu el ili (deorienta) falis apud Vanavara, kaj la alia flugis de okcidento. Aŭ ĉu vi opinias, ke la ĉefa kontakto de la objekto kaj Tero okazis en la regiono de viaj du lastaj ekspedicioj, sed iu peco apartiĝis kaj eksplodis apud vilaĝo Vanavara?*

— Ĝenerale ni inklinas al tiu ĉi varianto. Povis okazi jeno: la objekto flugis alte de okcidento. Ĝi komencis disfali. Probable en tiu loko, kie ni estis, falis unu el ties partoj. Sed ĉar la falintaj arboj estas direktitaj ĝuste al la sudaj marĉoj apud Vanavara, eble tie estis la sama objekto. Alivorte postaj detruigoj okazis tie kaj eble ankaŭ plie, kaj oni vidis la pecojn super rivero Lena kaj lago Bajkal. Du objektoj — estas preskaŭ neebla varianto. Preskaŭ neimageblas, ke du objektoj flugis samtempe renkonten unu al la alia. Certe oni povas proponi la hipotezon, ke unu el la objektoj celis damaĝi la Teron, sed la alia objekto detruis tiun unuan.

Jenas alia hipotezo: potencega objekto flugis de okcidento. La alia flugis de oriento por ke la unua ne falu sur Teron. Eble en iu punkto de la trajektorio okazis eksplodo, sed la kosmoŝipo mem forflugis plien. Similaj hipotezoj havas rajton por vivi. Sed ilin necesas pruvi.



Vladimir Opletajev [Surgut, Rusio]

Jen estas ankoraŭ unu kontribuo de V. Opletajev al la novlanĉita ĉi-jare rubriko "Simboloj de la landoj".

Samovaro

- simbolo de Rusio

Samovaro – metala aparato, en kiu oni boligas akvon por teo. Sinonimoj – temaŝino, tekaldrono. La vorto "samovar" en la rusa lingvo havas signifon de memkuiranta aparato, memkuirilo.

Samovaro estas en Rusio grava parto de la popolaj vivo kaj sorto. Ĝi simbolas poezion kaj rusan gastamon, rondon de amikoj kaj parencajn ligojn, sinceran kaj koran pacon. Tiu ĉi aĵo fariĝis necesega por la rusa teceremonio. Kiel simbolo de hejmeco kaj bonkoreco ĝi estas nepra familia atributo en Rusio. La samovaro famiĝis ankaŭ dank' al pluraj proverboj kaj verkoj de la klasikuloj de rusa literaturo Puŝkin kaj Gogol, Blok kaj Gorkij, en kies libroj la originala rusa tekaldrono estis nemalhavebla parto de la tradicia rusa vivo.

Sian naskiĝon la samovaro dankas al teo, kiu estis unuafoje importita en Rusion el Azio en la deksepa jarcento. La rusa nobelaro uzis ĝin tiutempe kiel kuracilon, sed jam en la deknaŭa jarcento teo disvastiĝis en Rusio kiel vaste uzata trinkaĵo, precipe en la urbaro. Ĝi konkuris kun sbitno – tradicia rusa varma trinkaĵo kun mielo kaj kuracherboj – preparata en sbitnujo, simila ekstere al tekaldrono sed posedanta interne tubon por braĝo.

Kie kaj kiam aperis unua samovaro? Neniu povas nun doni precizajn historiajn faktojn, sed estas konate, ke la fama teaparato estis inventita de rusaj metiistoj fine de la 18-a jarcento en la mondkonata urbo Tula, kies lertaj majstroj kaj metiistoj produktis altkvalitajn armilojn kaj pafilojn. La produktado de samovaroj iĝis tre profitdona entrepreno, kaj unuaj amatoraj samovarmetiistoj fariĝis tre baldaŭ riĉaj fabrikantoj. Kronike dokumentita fakto temas pri la jaro 1725, kiam en Tula ekfunkciis la plej unua samovarfabriko de I. Bataŝev, sed tutcerte evidentas ke la originalaj tekaldronoj en ĉi tiu urbo estis fabrikataj jam pli frue.

En 1808 en Tula funkciis sep samovaraj fabrikoj, dum en 1894 – jam 74 fabrikoj.

La samovaro venke konkeris la grandegan landon de la Balta maro ĝis la Pacifiko. En la jaro 1829 la samovaroj de la majstro Malikov el Tula estis honorigitaj per malgranda arĝenta medalo en la unua manufaktura ekspozicio en Sankt-Peterburgo. Ek de 1840 la samovaroj de Lomov ricevis rajton esti dekorataj per la ŝtata blazono, kiel plej supera honoraĵo de ilia alta metia kvalito. En 1904 dum la Internacia ekspozicio en Parizo al la samovaroj de Bataŝev estis atribuita la Granda Prizo.



Malgraŭ siaj eksteraj diferencoj ĉiuj samovaroj havis similan formon, konsistantan el pluraj detaloj: vandoj, kaldrono, subkaldrono, teniloj, tubo, krano ktp. Meze de la kaldrono, kiu povis havi cilindran, ovalan, rondan aŭ eĉ ekzotike kvadratan formon, troviĝis braĝa tubo kun forneto sube kaj forna disketo supre, sur kiun oni metis ceramikan aŭ porcelanan teinfuzujon. La ardo leviĝanta en la tubo boligis akvon en la kaldrono. La hejtajo el karboj, strobiloj, lignopecoj estis metata desupre en la tubon. Por verŝi akvon en la samovaron necesis nur depreni kovrilon de la kaldrono. La plej popularaj metaloj por fabrikado de samovaroj estis latuno kaj tombako. La tombakaj samovaroj kostis pli multe ol la latunaj kaj ilin preferis aĉeti riĉuloj aŭ nobeluloj. En la produktado de la samovaro estis okupataj sep diversmetiaj faklaboristoj, ĉiu el inter ili faris sian specifan fakan taskon. La fasonoj de samovaroj konstante aliĝis kaj fine de la 19-a jarcento da ili estis jam 165. Komence


de la 20-a jarcento apud braĝaj samovaroj aperis pli modernaj kerosenaj aparatoj kaj pli poste elektraj specimenoj.

La samovaro estis ne nur hejma apartenaĵo, oni kunprenis ĝin al vojaĝoj kaj eksterurbiĝoj, ekskursoj kaj piknikoj. Imagu al vi someran nokton aŭ malfruvesperon ie en provinca bienejo de la pasintjarcenta Rusio. La lupolkovrita verando banas sin en floraj aromoj, pepetas en boskoj ekdormantaj birdetoj, finiĝas tagaj laboroj kaj zorgoj. Tra la vespera kvieto aŭdiĝas jam diligenta bruo de granda familia samovaro fumanta kaj vaporanta. La samovaro majeste staras meze de la tablo kaj per siaj spegulaj rebriloj de la polurita korpo vokas al teumado soifantojn lacigitajn de la suna tago, kiuj senhaste kaj amike babilante plezure trinkas freŝe infuzitan teon kun rafinita peca sukero. Al la rusa teceremonio apartenas ankaŭ bongustaj konfitaĵoj el beroj kaj fruktoj kaj diversaj bakajoj: bulketoj, biskvitoj, ringoj. En Rusio oni tradicie infuzas teon ne tuj antaŭ ol trinki ĝin el tetaseto aŭ kuiras ĝin, sed por tiu celo estas uzata teinfuzujo, kiu povas havi multe pli grandajn formojn ol ĝiaj originaj orientaj praspecimenoj. Samovaroj apartenis ankaŭ al mondumaj salonoj, kie ili kolektis ĉirkaŭ tetaĵoj nobelajn sinjorojn, diplomatojn, artistojn, belajn damojn...

Sed nun, ĉu aktualas vaporsamovaroj nun, kiam ni vivas en la impetaj ritmoj de la dudekunua jarcento, ĉirkaŭataj de tre oportunaj elektronikaj aparatoj kaj serviloj? La malnova samovaro ĉiam pli kaj pli fariĝas ekzotikaĵo. Kvankam ĝi ĉeestas en pluraj domoj en Rusio, sed elektraj akvoboligiloj aktive forgesigas tradician rusan tekaldranon, kiu trovas sian ekpozician lokon nur sur ŝrankoj, en keloj aŭ en muzeoj. Sed fremdlandano, vizitanta Rusion, devas nepre peti siajn gastigantojn aranĝi teumadon ĉe samovaro por ĝui tradician guston de la rusa teo kaj originalan kortsuŝan ceremonion de ĉetabla kunestado.

Ni daŭrigas publikadon de gramatikaj lecionoj de J-L Tortel.

Gramatika leciono № 18



Saluton, karaj geamikoj!

Ankaŭ al nia nesto venos iam la festo (93)
 Mem-kompren-eble, ĉu ne? = ankaŭ por ni iam venos bona tempo. sukceso. ĝojo...
 i-am: i = ne-preciz-eco: am = tempo: do en tempo nepreciza, en iu tago aŭ alia...

Aperas interna rimo (kiun ni klar-igis en nia babilado 1-a) inter *nesto* kaj *festo*.

Antaŭ ĉio zorgu oficon, plezuro atendos sian vicon (104)

Interna rimo = *-icon*.
Zorgi = 1) okupiĝi pri... 2) plen-umi iun taskon, iun oficon.
 Ankaŭ tre kompreneble; ni povus ali-diri: "unue laboro, poste plezuro", aŭ pli elegante: "unue la tasko, nur poste la Pasko". Kial pli elegante? Denove pro la interna rimo: *-asko*. Sed en:

Al farun' malbonspeca ne helpos la spico (25)

... kie estas la interna rimo? Nu, en *eca* kaj *ico*.

"Sed tio ne estas rimo!" eble pensos vi (rimo estas la simileco de la akcentitaj silaboj kaj de la postaj sonoj).

Rigore, vi pravos. Sed en Esperanto oni ofte renkontas "proksim-umajn" rimojn, kiujn Esperanto nomas: "abortaj rimoj" (*Parnasa Gvidlibro* de Kalocsay kaj Waringhien: nepre necesa gvidilo por poezi-um-antoj). Estas la kazo ĉi tie.

Tio aperas pro la influo de la rusa lingvo, kiu toleras ilin, ĉar ĝi prononce emas mis-distingi kelkajn vokalojn. En aliaj lingvoj tiaj rimoj ne estas tolerataj; ili ĉi tie estas indiko de la lingva kulturo de Zamenhof.

Demando ne kostas, demando ne dev-igas (304)
 Dev-igas = faras, ke iu devas...

Donado de almozoj neniam malriĉ-igas (371)
 Malriĉ-igas = faras iun malriĉa...

Kiu cedas al sia infano, ĝin pere-igas per propra mano (975)
 Pere-igas = faras, ke ĝi pereas, mortas...(Ni notu, ke *infano* estas senseksa, do: *ĝin*)

Kiu rompis la glason, ord-igu la kason (1093)
 (Kiu rompas, tiu pagas) Ord-igu = faru, ke io estu en-orda...

Kiu tro sin prav-igas, tiu mem sin kulp-igas (1118)
 = faras sin prava; faras sin kulpa...

Kiu ludas kun koto malpur-igas la manojn (1034)
 = faras malpura... (Ni notu, ke nia Zamenhof tie eraris, verŝajne sub la influo de la nacia lingvo, el kiu li prenis tiun proverbon: *per koto* estus ĝusta; sed:

Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras (1791)!

Ni vidas, ke *-IGI* estas tre uzata en Esperanto. La signifo de *IGI* estas: *fari ...a; fari, ke io estu ...a* (la ... indikas la radikon).

Tiun elementon en-kondukis en nian lingvon la latina (*castus, castIGare; mitis, mitIGare...*) sed precipe la germana (*kund, kuendIGen; rein, reinIGen; satt, saettIGen...*).

Nun, kvankam:
Laboro fortigas, ripozo putrigas (1240)


ni ankaŭ rajtas opinii, ke:

Laboro finita, ripozo merita (1239)

Do ĝis la venonta babilado!

Johan'-Luko

Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...



Esperantigis kaj sendis al la redakcio Viktor Derĵavin [Aŝa, Rusio]

Vortaro de stultaj terminoj

Minuso estas $\frac{1}{2}$ de pluso

- ❖ Amiko - estas ho..., kiu komprenas vin de duonvor...
- ❖ Anĝela karaktero - diabla toleremo.
- ❖ «Antiglobalismo» - la sola movado, kiu kunigas la tutan mondon.
- ❖ Bonŝanco - rezulto de tre diligenta preparado.
- ❖ Edzo - kio restas de viro post geedziĝo.
- ❖ Enuo - malsano de la feliĉuloj.
- ❖ Feliĉo - ne havas pluralon.
- ❖ Idealo - malproksimiĝas proporcie de proksimiĝo al ĝi.
- ❖ Ĵaluzo - plej sincera formo de flateco.
- ❖ Kamelo - ĉevalo kun granda viva sperto.
- ❖ Kaprico - deziro sen bezono.
- ❖ Komitato - grupo de homoj, decidanta, ke eblas fari nenion.
- ❖ Komputilo - narkotaĵo: rapida alkutimiĝo, ne eblas forkroĉiĝi.
- ❖ Masaĝo - plej bona rimedo maldikiĝi... por masaĝisto.
- ❖ Memkritiko - al ĝi oni povas ne reagi.
- ❖ Memoro - la sola paradizo, el kiu neniu povas nin forpeli.
- ❖ Mensogo - pli danĝera ol ĝi estas nur vero.
- ❖ Muso - ligilo inter homo kaj komputilo.
- ❖ Nenionfarado - plej alta formo de libero.
- ❖ Nokta gardisto - reprezentanto de la antikva profesio - dormas kontraŭ mono (salajro).
- ❖ Nostalgio - kiam mankas kien reveni.
- ❖ Ombro - silentema eĥo.
- ❖ Paraŝuta sporto - se la unua provo malsukcesis - ĝi estas ne por vi.
- ❖ Pigrulo - ĉiam trovas plej facilan solvon de problemo.
- ❖ Pinto - rando de abismo.
- ❖ Policisto - la sola profesio, kie kliento ĉiam ne pravas.
- ❖ Porĉiam - la plej longa vorto.
- ❖ Senelirejo - plej bona loko por cerbumi.
- ❖ Silento - la sola aĵo el oro, kiun malamas la virinoj.
- ❖ Striptizo - demonstrado de eternaj valoraĵoj.
- ❖ Sukero - portas malagrablan guston al kafo, kondiĉe ke ĝi tie mankas.
- ❖ Venko - estas malamiko de milito.
- ❖ Vico - loko, kie homoj timas perdi unu la alian.

Kolektis kaj esperantigis
Nekludov Oleg [Buzuluk, Rusio]

- Mi revas perlabori \$10000 monate, kiel mia patro.
- Ĉu via patro perlaboras \$10000 monate?
- Ne, sed ankaŭ li pri tio konstante revas.

*

Programero en cirko: krokodilo ludas pianon kaj hipopotamo kantas romanojn. Grandega sukceso! La cirkodirektoro diras al la dresisto:

– Diru al mi, ja ne povas esti ver-vere, ke krokodilo pianludas kaj hipopotamo kantas. Konfesu al mi vian sekreton, ĉio restos inter ni...

– Vi pravas, certe tio ne povas esti. Verdire, la hipopotamo nur malfermas la buŝon, sed la krokodilo kaj kantas, kaj pianludas...

*

Loĝejposedanto:

– Mi ne ellasos vin el tiu ĉambro, kiun vi luis, ĝis kiam vi pripagos ĝin.

Studento:

– Grandan dankon! Fin-fine mia loĝado estas garantiata por longa tempo.

Premier-ministro elpaŝas en la parlamento:

– Antaŭ mia enposteniĝo nia lando staris sur rando de abismo. Kaj mi volas, ke ĝi faru paŝon antaŭen!

*

Direktoro de aviadilkompanio riproĉas kapitanon de aviadilo:

– Mi petas vin sekvontfoje pensi, antaŭ ol paroli kun la pasaĝeroj.

– Kaj kio okazis?

– Pasintfoje, kiam via aviadilo jam pretis alteriĝi, vi diris al la pasaĝeroj en la mikrofonon: "Antaŭ ol ni alteriĝos, permesu al mi adiaŭi kun vi ĉiuj."

*

– Kiam mi aŭdas sonon de vekhorloĝo, al mi ŝajnas, ke oni enpafas en min.

– Kaj vi tuj vekigis?

– Male, kuŝas kvazaŭ mortpafita.

*

Paciento en malsanulejo petas, ke lin akceptu "orel-okula" kuracisto. Oni al li klarigas, ke ekzistas aparte „orela” kaj aparte „okula” kuracisto.

– Mi volas orelan okuliston!, – insistas la paciento.

– Sed kio al vi okazis?

– Mi aŭdas tute alion, ol mi vidas!

Kolektis kaj esperantigis **Havina Jelena**
[Alapajevsk, Rusio]

Inter viroj kaj inoj

– Kiaj virinoj al vi plaĉas: ĉu saĝaj aŭ belaj?

– Nek tiuj, nek aliaj. Mi bezonas nur vin!

*

– Kara mia, postkiam ni geedziĝos, mi subtenos vin en ĉiuj viaj malfeliĉoj kaj malagrablaĵoj.

– Sed mi ne havas ilin!

– Mi ja diris – postkiam ni geedziĝos...

*

– Ni ambaŭ kun la edzino estis feliĉaj dum dudek jaroj.

– Kaj poste ?

– Poste ni renkontiĝis.

*

Junulo kisis nekonatan junulinon, sidantan apud li sur la parka benko. Ne frontinte reziston li kisis ŝin ankoraŭfoje kaj demandis mire:

– Sed kial vi silentas ?

– Mia patrino malpermesas al mi paroli kun nekonataj viroj.

*

Junulo demandas sian junulinon:

– Diru al mi, ĉu vi povus edziniĝi al riĉa stultulo?

– Malfacilas respondi. Kaj kiun kapitalon vi posedas ?


En kafejon eniras homo kun hundo kaj vetas kun la ĉeestantoj, ke lia hundo povas paroli. Sed la hundo silentas.

La homo pripagas la malvetitan sumon kaj foriras akompanata per komuna ridado.


– Pro vi ni malgajnis grandan sumon! – riproĉas mastro la hundon. – Kial vi ne ekparolis?

– Naivulo! – respondas la hundo.

– Vi nur imagu, kiom da mono ni gajnos morgaŭ !



Sendis Ildus Garifullin, [Krasnoufimsk, Rusio]



Wikipedio — viva enciklopedio

La Reto okupas pli kaj pli grandan lokon en nia vivo. Ĝi donas pli kaj pli da servoj por homa oportuno, en la reto realiĝas pluraj interesaj projektoj, pri kiuj oni ne povis eĉ revii en la antaŭa epoko. Inter tiuj sukcese realigitaj kaj realigataj projektoj oni devas menciigi projekton de la Tutmonda Reta Plurlingva Enciklopedio – «Wikipedia».

Ĉar Wikipedia estas tutmonda kaj plurlingva, ĝin ne povis preteratenti esperantistoj. Hodiaŭ Wikipedia estas la plej granda enciklopedio en la mondo. Sukcesa realigo de esperanta parto en Wikipedia sub la titolo «Wikipedio» estas la vica pruvo de praktika utilo de la lingvo

Esperanto. Tial ni decidis rakonti pri Wikipedio ĝuste en rubriko «La Praktiko».

Viktor Kudrjavcev [Jekaterinburg, Rusio]

Wikipedia

<http://wikipedia.org>

Wikipedia estas plurlingva, komuna, libere disvastigata enciklopedio en Interreto, funkcia ek de la 15-a de januaro de 2001.

La artikolojn por *Wikipedia* verkas volontuloj el la tuta mondo kaj preskaŭ ĉiujn tekstojn kaj artikolojn povas kaj rajtas korekti kaj ŝanĝi iu ajn. Ĝuste dank' al tiu ebleco de libera aperigo, renovigo kaj perfektigo de materialoj, populareco de *Wikipedia* kreskas ekde la momento de ĝia apero, ĉar ĉiu homo povas komuniki en Wikipedio ion interesan pri la temo, en kiu li aŭ ŝi estas fakulo.

Pri utilo kaj populareco de *Wikipedia* diras la statistiko - momente paĝaro wikipedia.org eniras en la unuan dekon de la plej vizitataj paĝaroj en la mondo, ĝi altiras 683.000.000 da vizitantoj jare, kiuj legas pli ol 10 milionoj da artikoloj. *Wikipedia* entenas pli ol 1.740.000.000 da vortoj en ĉiuj fakoj kaj laŭ kvanto de informoj kaj tema diverseco estas la plej plena en la mondo enciklopedio.

Prafonto de *Wikipedia* estis "Nupedio" - anglalingva projekto, kiu realigis principojn de libero de informado, sed artikolojn por "Nupedio" verkis sciencistoj kaj akademianoj. Principoj de *Wikipedio* estas tute aliaj - ĝin povas kontribui iu ajn. *Wikipedia* ne havas salajratajn aŭtorojn kaj redaktorojn, ĉiuj materialoj aldoniĝas kaj renoviĝas far la partoprenantoj mem.

Gravega diferenco de *Wikipedia* de *klasikaj enciklopedioj* estas ebleco por ajna uz-

anto ajnmomente fari ŝanĝojn, aldonojn, korektojn kaj rimarkojn en la tekstoj de la publikigitaj artikoloj. La saman artikolon povas kunverki kelkaj aŭtoroj kaj eblajn malkonsentojn kaj diferencojn de vidpunktoj oni pridiskutas en la apartaj paĝoj. Ajna homo rajtas aliĝi al la diskuto kaj esprimi sian vidpunkton. Tial *Wikipedia* estas samtempe granda diskuta forumo.

Reguloj

Reguloj de *Wikipedia* estas ne tre severaj kaj lasas lokon por libera traktado de ajna afero por ajna aŭtoro, do, ne ekzistas "senriproĉaj aŭtoritatoj" kaj "la lastaj instancoj". Tamen kelkaj postuloj estas strikte obeataj – unue: ne eblas publikigi materialojn, kiuj estas defendataj de aŭtoraj rajtoj; due: necesas esprimi neŭtralan vidpunkton en prezentataj materialoj, sen emfazo de personaj plaĉoj kaj preferoj; trie: necesas indiki la fontojn de la publikigitaj informoj. Ĉiuj publikigitaj informoj estas kontrolataj kolektive, rezulte ajna nefidinda materialo fin-fine malaperas.

Diference de tradiciaj enciklopedioj *Wikipedia* estas ege "hiperteksta" strukturo kaj ju pli da ligoj estas en la artikoloj, des pli bone.

Hodiaŭ *Wikipedia* funkcias en 256 lingvoj, el kiuj preskaŭ cento estas aktivaj, 15 lingvaj partoj enhavas pli ol 100.000 da artikoloj, inter ili, ekzemple, la ruslingva parto entenas pli ol 280.000 da artikoloj, kaj la esperanta parto – (por aprilo de 2008) havis 99356 artikolojn.

Wikipedio

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto>

Wikipedio estas esperantlingva parto de *Wikipedia*, kiu servas ne nur por Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto. Sube ni montros al vi, kiel Wikipedio, ekzemple, prezentas nian lingvon:

Esperanto

estas la plej multe parolata internacia planlingvo. Ĝia nomo venas de *Doktoro Esperanto*, la plumnomo per kiu L. L. Zamenhof publikigis la bazon de la lingvo en 1887. La intenco de Zamenhof estis krei facile lerneblan, neŭtralan lingvon por la internacia komunikado, kiu tamen ne malaperigu la jam ekzistantajn lingvojn.

Nuntempe Esperanto estas uzata por multaj aferoj, inter kiuj vojaĝado, korespondado, kultura interŝanĝo, literaturo kaj lingvo-instruado. Ĝin parolas inter 100.000 kaj 2.000.000 da homoj en la mondo, el kiuj proksimume 2.000 estas denaskaj parolantoj.

Specifaj trajtoj

La strukturoj de Esperanto subtenas la naturan emon de la homa pensado al analogio kaj estas pli trarigardeblaj ol tiuj de la plej multaj etnaj lingvoj. Tre produktiva sistemo de vortfarado garantias jam en frua stadio de la lingvolernado nuancitajn esprimeblecojn. Sekve fruaj sukcesoj emocias motivas la lernanton progresi.

Tial la sama lernintenso ebligas akiri kompareblan lingvan nivelon en kompare tre malgranda ono de la tempo necesa por etna lingvo.

Ĝenerale pluraj monatoj da studado de Esperanto egalas kelkajn jarojn da lernado de lingvoj kiel la angla aŭ la franca.

Pro la domino de eŭropdevenaj vortradikoj, ekzemple azianoj bezonas pli da lernotempo, tamen malpli ol por lerni alian azian lingvon.

En sia fama "Unua Libro" de Esperanto (1887) Zamenhof prezentis la gramatikon per 16 reguloj. (Kiu kompreneble ne klarigas ĉiujn detalojn de la lingvouzo.) Tiu ĉi gramatiko eniris en la sistemdokumenton "Fundamento de Esperanto", kiu, laŭ decido de la unua Universala Kongreso en 1905, garantiu la kontinuecon de la lingvoevoluo.

Vizitu "Wikipedion", kaj espereble ankaŭ vi trovos tie multon interesan kaj utilan por vi kaj povos mem partopreni en laboro de tiu reta fenomeno!

Evidente, impresoj, ricevitaj dum spektado de ĉi-jara Eŭropa Ĉampionado iĝis fonto por tiu ĉi kontribuo de nia malnova leganto kaj aŭtoro

Sergej Paĥomov [Kirov, Rusio] <esper@nto.kirov.ru>

Pilko ronda – ludo tutmonda!

Futbalo estas pli ol ŝatata sporta ludo, futbalo altiras atenton de milionoj da homoj tra la tuta mondo kaj por multaj futbalo iĝis preskaŭ vivmaniero. Homoj ŝatas, amas belan futbalon! La plej fortaj emocioj ĉeestas dum tiu piedpilka ludo. Finalo de Eŭropa Ĉampionado estas festo, tre atendata en multaj landoj de multaj homoj. Finalo de Eŭropa Futbala Ĉampionado 2008 okazis en Aŭstrio kaj Svisio.

Iom da statistiko. Entute en Eŭropa Ĉampionado 2008 partoprenis 52 naciaj land-teamoj.

En anticipaj etapoj renkontiĝis 50 teamoj, disdividitaj je 7 grupoj, por difini inter si 14 la plej fortajn, kiuj trafis en la finalan parton. Ankoraŭ 2 teamoj - de Aŭstrio kaj Svisio, trafis la finalan partoj kiel mastroj de la Ĉampionado. Do, ĝenerale en la Finalo "Eŭro-2008" ludis 16 teamoj.

Estas interese, ke en "Eŭro-2008" partoprenis teamoj el 7 Aziaj landoj: Armenio, Azerbajĝano, Cipro, Israelo, Kartvelio, Kazahstano, Turkio.

Kvar teamoj venis ne el apartaj landoj, sed de ties teritorioj: teamoj de Ferojoj, Kimrio, Nord-Irlando, Skotlando.

Ne partoprenis la ĉampionadon teamoj el mini-ŝtatoj - Vatikano kaj Monako, kvankam tiuj estas memstaraj landoj, sed teamoj el San-Marino kaj Andoro partoprenis.

16 teamoj en la finala parto estis disdividitaj je 4 grupoj. Post la unua engrupa konkurso la ĉampionadon lasis 8 teamoj - po 2 teamoj el ĉiuj grupoj.

Post ¼ de finalo aliaj 4 teamoj forfalis, poste ankoraŭ 2 post ½ de finalo. Rezulte restis nur 2 plej sukcesaj teamoj, kiuj batalis inter si por la ĉampiona titolo.


Ekde 1960 okazis 13 Eŭropaj Ĉampionadoj en 12 landoj kaj 9 land-teamoj sukcesis iĝi ĉampionoj: Ĉeĥoslovakio, Francio (duoble), Germanio (trioble), Grekio, Hispanio (duoble), Italio, Nederlando, Danlando, Sovet-Unio,

Estas unu tendenco por teamo de Germanio: la unuajn Eŭropajn orajn medalojn ili gajnis en 1972 jaro, la duan fojon ili iĝis ĉampionoj post 8 jaroj - en 1980, la trian - jam post 16 jaroj en 1996, do ĉu la sekvan, kvaran fojon ili gajnos post 24 jaroj en 2020 jaro?

Grekio, pasintfoja ĉampiono, ne gajnis eĉ unu matĉon kaj okupis la plej suban lokon en la konkurstabelo. Italio, Francio ne sukcesis eliri el grupaj turniroj.

Rusiaj futbalistoj ĉi-foje tute neatendite gajnis la 3-an lokon, kio estas por rusia futbalo grandega sukceso.

Tamen mi opinias, ke ne tiom gravas, kiu teamo kiun lokon gajnis. Gravas, ke de futbalo gajnas ĉiuj ni, ĝiaj ŝatantoj kaj adorantoj, kiuj ricevas de tiu ludo fortegajn impulsojn, pozitivajn emociojn kaj simple grandegan plezuron!



Bill Thorne

[Londono, Britio]

Ekzistas opinio, ke futbalo estas "vivo kaj morto". Oni eraras: futbalo estas multe pli grava!

Feliĉaj familioj estus pli multnombraj, se la edzoj klopodus kompreni siajn edzinojn, sed la edzinoj klopodus kompreni futbalon.

*

Post futbalmatĉo ambaŭ teamoj havas egalan rezulton.

Opinio de optimisto:

Ni duongajnis.

Pri la samo - pesimisto:

Ni duonmalgajnis.

*

Mi estas 50-jara, mi naskiĝis la 5-an de majo, mi loĝas sur la 5-a etaĝo, mi havas 5 infanojn, Tiel mi metis 5 mil rublojn por nia futbalteamo en ĉampionado — Kaj ĝi gajnis la unuan lokon?

— Ĝi gajnis la 5-an....

*

Futbala ŝatanto sidas apud televido, ĝuante futbalon. La komentisto diras:

— Vi spektas futbalan ludon...

— Diable, de kie vi scias tion?

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Dudeko da studentoj lernas Esperanton. La klubanoj deziras korespondi.

E-klubo ĉe Instituto de la Sociaj Sciencoj *s-ro Dorg' Balduziin*
Poŝt-kesto 456.

Ulaanbaatar
210523.

Mongolio

baldorghbalin@chinggis.com

Mi estas studento, kiu ŝatus komuniki kun la mondo kaj ŝatas lerni lingvojn. Int: lingvoj, skoltoj, medito, historio

Pentland Jake

Ashford

Britio

jake.pentland@gmail.com

Mi estas esperantista komercisto en Ĉinio, (1963) mi volas uzi Esperanton en mia vivo kaj laboro. Int: vojaĝo, komerco, teo ktp.

Xiao Fujun

Chengdu

Ĉinujo

grupoyema@hotmail.com

Mi estas 25 jara viro. Mi ŝatas legi pri literaturo, (Sweig, Steinbeck, Balzac, Asimov, Simack), scienco kaj komputiloj. Int: scienco ĉar mi laboras en centro de esplorado. Mi ŝatas vojaĝi.

Felix Beotien

Paris

Francio

kayhman@gmail.com

Mi volas trovi personon por esperante paroli. Int: lingvoj, muziko

s-ino Fŭgrouche Helene

Parizo

Francio

helenerialland@hotmail.com

Mi estas 50 jara instruisto de la rusa lingvo.

Min interesas universologio, universalaj leĝoj laŭ kiuj disvolviĝas nia mondo. Mi volonte korespondus kun ĉiuj.

Olga Trojeĝlazova

Kirova 35-44

Gurjevsk, 652780

Kemerova obl.,

Rusio

threeete@yandex.ru

Mi estas 31 jara virino, komencanto. Mi estas flegistino en hospitalo. Int: tablotenis, ĝardenumado. Mi ŝatus praktiki la lingvon pere de korespondado. Mi loĝas kun mia edzo en domo kun bela ĝardeno. Mi ŝatus korespondi kun knabinoj/virinoj pri ĉiutaga vivo, sporto, ĝardenkulturo.


Diána Prozlikné

Gyúrós

Budapeŝto,

Hungario

prodius@citromail.hu



Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

Mi serĉas la pli bonan manieron por disvastigi kaj instrui Esperanton. Bonvolu sendi al mi mallongan mesaĝon dirante:

- Kiel vi lernis pri Esperanto, en kiu jaro?
- Kiu aŭ kiel estis via unua kontakto kun Esperanto?
- Kiel vi lernis Esperanton, en kiu jaro.
- Ĉu vi lernis en lernejo?
- Ĉu en klubo, biblioteko, grupo en domo?
- Ĉu hejme, sola, per libro, per interreto?
- Ĉu vi havis aliajn helpilojn? (sonbendoj, diskoj, filmoj, aliaj libroj, amiko kiu helpis vin, instruisto)
- Bonvolu aldoni iujn detalojn kiujn vi konsideras utilaj kaj kiuj povas helpi al mi. Mi volas kompili statistikon pri tio kiamaniere oni ekscias pri ekzisto de Esperanto kaj decidas lerni ĝin.
- Due mi volas scii kiuj metodoj pli sukcesis en la instruado kaj lernado de Esperanto.

Enrique Ellemberg

Fremont, California, Usono

enrike@aol.com

Mi estas redaktoro de www.internacia-gazeto.com

kaj serĉas novajn amikojn kaj kunlaborantojn por nia rela revuo.

Giuseppe Affaticati

Plaĉenzo,

Italio

gazeto@internacia-gazeto.com

Mi estas 16 jara knabo, komencanto. Int: lingvoj, muziko, sportoj. Mi ne havas instruiston, do mi deziras korespondi por praktiki Esperanton.

Nate Lepage

Albany, NY

Usono

lepagedude@charter.net

Mi estas 18 jara komencanto. Mi estas studento. Mi ŝatas legi librojn pri politiko, ekonomio, historio, kulturo; kaj scienc-fikcio. Mi ŝatas aŭskulti klasikan muzikon. Mi deziras korespondi kun homoj tra la tuta mondo. Havaja insularo estas parto de Usono.

Eliot Saint-John

Honolulu, Hawaii,

Usono.

eliotsj@gmail.com

Mi estas 39 jara virino, progresanto. Mi estas instruisto de la rusa, de la angla kaj de Esperanto. Int: Esperantomovado, psikologio, ezoteriko, vojaĝoj, komunikado kun proksimaj animoj. Mi ĉiam estas feliĉa trovi novan veran amikon.

Eŭgenia

Slovaĉevskaja

Kievo

Ukrainio

es-peranto@bigmir.net

Mi estas 15 jara knabo. Int: Lingvoj, Literaturo. Mi ŝatus trovi novajn korespondamikojn.

Stefano Frullini

Chieti

Italio

steve_f@hotmail.it

komencanto@r66.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

